

ESPERANTO

KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Aperas monate sub la aŭspicio de la
FRANCA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ EDUKISTOJ
(G. E. E.)

Redakto - Sekretario :
D-ro Andreo ALBAULT
11, rue des Feuillants
Toulouse (Francio)



Eldono - Direktoro :
H. MICARD, Emerita Instruisto
Epineux - le - Séguin (Mayenne)
Francio

N^o 2
FEBRUARO
1957

Jara abono : 400 fr. fr., pagenda en Francio al
Edmond BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M-et-L.), Francio.
Poŝt-ĉek-konto : 143-867 Nantes;
aŭ al la landaj perantoj de I.P.R. (vidu 2-an kovrilpaĝon)
aŭ al la landaj perantoj kaj delegitoj de U.E.A.



Informoj el niaj Asocioj

Ni opiniis ke la aperigo de la jenaj informoj utilos al niaj legantoj.

I.L.E.I.

Funkciuloj por la periodo 1955-58 :

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, 70, Av. Victor-Ségoffin, *Toulouse*, Francio.

Sekretario, Kasisto, Gvidanto de Centra Oficejo : F-ino Violet C. NIXON, 183, Woodlands Park Road, Bournville, *Birmingham*, 30, Anglio.

Konsilantoj : S-roj HEITMÜLLER, SVANTESSON, TACCANI.

Membro-Asocioj :

Aŭstrio, Britio, Francio, Germanio, Italio, Suomio, Svedio.

Aktivaj reprezentantoj en aliaj landoj :

Aŭstralio, Belgio, Danlando, Irlando, Izraelo, Japanio, Jugoslavio, Kanaria Insularo, Maroko, Norvegio, Portugalio, Urugvajo, Usono.

G.E.E. (800 anoj) (franca asocio)

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, Liĉea Lingvo-instruisto (adreso supre).

Generala Sekretario : S-ro F. THÉBAUD, C.C. Jeunes filles, *Caudry* (Nord).

Kasisto : S-ro E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, *Baugé* (M.-et-L.).

S.B.E.T. (192 anoj)

Prezidanto : S-ro Cyril LOVE, 11 Church Walk, Penn Fields Wolverhampton.

Sekretario-Kasisto : F-ino Violet C. NIXON (adreso supre).

LANDA SEKCIO HESSEN de « Esperanto-Unuigo de Germanaj Instruistoj » (42 anoj)

Sekciestro : Kurt SCHÖNRICH, Hallgarter Str. 10, *Wiesbaden*.

INSTRUISTA SEKCIO ĉe « Slovenia Esperanto-Ligo » (... anoj).

Prezidantino : Sonjo TAVČAR.

Sin turni al Sek. de S.L.E.L. : Marinko GIVOJE, Poŝtfako 275, *Ljubljana*.

E.U.G.I. (135 anoj) (germana asocio)

Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto : S-ro Heino HEITMÜLLER, (23) *Bremen* 8, Waller Heerstrasse 134.

AŭSTRALIA ESPERANTO-SOCIETO DE INSTRUISTOJ.

Prezidantino : D-ro SUMMERS.

Sekretariino : Gertrude POLLARD.

« GRAJNOJ EN VENTO », la *Tutmondaj Interlernejaj Rondo* Marcel ERBETTA, rue des Pins, 66, Bienne-Biel 7, Svislando.

INFORMOJN pri aliaj landaj edukistaj asocioj ni volonte publikigos.

ATENTU

Post Montevideo, ni devas repensi niajn metodojn. Nedubleble ni devas penetri en ĉiujn kulturajn mediojn aŭ pereji.

Unu el la rimedoj penetri en tiujn mediojn estas en viaj manoj, karaj legantoj, kaj plie vi mem rikoltos la frukton de via laboro : traduku el la esperantaj gazetoj ĉiujn artikolojn, kiujn vi opinias interesaj por iu gazeto nacilingva... ĝuste elektita.

Tiel vi konigos nian lingvon en larĝaj tavoloj kaj certe vi ricevos nur helpon de koncernaj redakcioj, ĉar vi servos ilin per interesaj artikoloj de alilandaj aŭtoroj.

**

Traduko kaj Publikigo, en la pedagogia gazetaro, de la artikoloj de I.P.R. estas permesata. Nepre estu indikataj : 1° la aŭtoro (se eble lia loĝloko) 2° la fonto (lasante la titolon en Esperanto kaj jene : « Internacia Pedagogia Revuo », jaro, numero, paĝoj).

Ni petas vin sendi 2 pruvekzemplerojn al la redakcio (ni transsendos unu al la aŭtoro).

ESPERANTO KAJ KULTURO**Internacia Pedagogia Revuo**

Redaktejo : D-ro ALBAULT, 11, rue des Feuillants, Toulouse, Francio.

Administrejo (abonoj, ktp.) : E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.), Francio.

Eldonejo : H. MICARD, Emerita Instruisto, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Francio.

ESTONTO DE I. P. R.

Responde al nia enketo enkondukita en la decembra numero per la letero de S-ano H. SCHULER, ni ricevis 4 valorajn respondojn. Evidente ekzistas inter nia legantaro da nete malsamaj opinioj.

Ni reproduktas parton de tiuj respondoj ŝanĝante eĉ ne unu komon.

Iu franco, rekonante ke la revuon oni povus plivalorigi, tamen preferas ĝin kiel ĝi estas :

« Kvankam S-ano H. SCHULER diras mi opinias vian revuon interesegegan ; kaj se estonte vi aldonos pli multe da pedagogiaj artikoloj kiuj plivalorigos ĝin, tamen vi ne forgesu ke, instruistoj kaj profesoroj ne estas la nuraj legantoj. Plie via distra paĝo estas necesa, kiel en ĉiu bona revuo, ĉar flanke seriozaj aferoj, ĝi ripozas la spiriton. » (franco)

Germano eĉ pli nete diras :

« Emerito respondas al vi je vian demandon de I.P.R. n. 10 pag. 109.

Mi gratulas kore por la redakto de la gazeto. Ĝi estas helpo por la komencantoj. Ankaŭ la grandaj nombro de germanaj legantoj estas memlernantoj kaj ŝatas simplajn tekston.

En la dormoĉambro (pag 105 + 106) kaj plie « lernu kaj instru » , la dua leciono en la lasta numero, pag 113 ĝis 117 estas helpo, kiu ni uzas.

Ankaŭ nia pedagogia revuo estas valora. Lernu per bildoj ! bone, bonege. » (germano)

Nia movado evidente suferas pri manko de internacia gazeto por komencantoj. Tiaj ekzistas por studi naciajn lingvojn. Mi tute aprobas ĉi-rilate la opinion de S-ano RAKUŠA en la « Suda Stelo » kiu dediĉas artikolserion al la didaktiko de Esperanto-kursoj. Ja mankas ŝtupo inter la kursoj kaj... la efektiva ĝuo de interesaj artikoloj. Sekve plej multaj Esperanto-gazetoj naciaj suferas pro tio kaj devas dediĉi paĝojn al la perfektigemoj : tio danĝere pezas sur la nivelo de la tuta koncerna gazetaro. Bedaŭrinde I.P.R. originas el 12 paĝoj prenitaj el 20-paga gazeto kiu konis tiun ŝarĝon.

Sed ni vidu la malan opinionon.

Alia franco skribas :

« Ni legis plezure la artikolon de H. SCHULER. Same kiel tiu samideano ni deziras ke I.P.R. enhavu nur pedagogiajn artikolojn rezervante unu paĝon por informoj » (franco).

El Nederlando venas la jena saĝa kaj pripensiga averto :

« Mi tute samopinias kun s-ro SCHULER. La nuna dueca karaktero de nia revuo certe malsukcesigos ĝin ; kompreneble mi tre bone komprenas la malfacilaĵojn, sed por neesperantistoj la revuo havas apenaŭ ion valoran. Se ni tiel daŭrigos ni neniam venkos la iom sektecan karakteron de la esperantista movado. En Pedagogia Revuo ni certe ne bezonas esperanto-lecionojn ». (nederlandano)

Efektive la kerno de la afero estas tie : ĉu ni daŭre elspezos nian monon (abonantoj) kaj nian tempon (aŭtoroj kaj redaktejo) por havi nur internan

bulteneton aŭ ĉu ni volas krei indan I.P.R., kiu kapablu vere prezenti nian movadon en la pedagogiaj medioj? Jam antaŭ la unua mondmilito aperis tia I.P.R. kiu estis agnos ata kaj respektata de la pedagogia gazetaro neesperanta! Ni certe povas kaj do devas reatingi tiun staton kaj de jaro al jaro krei imponan I.P.R. Sed por tio necesas ke ni unuigu kaj koncerne kvanton kaj koncerne metodon.

Koncerne kvanton? Oni volis aŭguri, ke ne certas ke I.P.R. sukcesos kiel internacia gazeto! La faktoj respondas: I.P.R. estas legata en pli ol 30 landoj. Mankas nur la atingebla kvanto ĝis nun. Ĝin ni pli rapide havus se ni havus la subtenon de nia internacia organizo: ni vane proponis kunlaboron. I.P.R. certe estas internacia. Ĉu ĝi estas vere pedagogia? Ne ni devas subporti la tutan respondecon pri ties mankoj. La komunikoj de nia internacia organizo povus aperi en I.P.R.: ili ja aperis en « Esperanto et Culture » ĝis 1955 inklude. Unu forta gazeto oficiale rekonita certe pli bone sukcesus. Ke du iniciatoj diverĝis ne konante unu la alian meze de 1955, pro okaza neeblo de kontakto, ne devas poreterne bari la vojon! G.E.E. je propraj riskoj kapablis krei firman platformon por nia agado. Nun apartenas al aliaj fari la duan paŝon: kaj ni ĉiuj kune finkonstruu! Ni ne vane rifugu malantaŭ malplena formalismo.

Koncerne metodon? Resume: ĉu ni havu bulteneton por komencantoj kiu devige perdos kaj legantojn por si kaj esperantistojn por la movado, aŭ ĉu ni kreas dignan revuon allogan por neesperantistoj? Alidire, bulteneton de sekto aŭ revuon, kiu allogu al Esperanto per sia enhavo?

Kompreneble mi mem prenas la tutan respondecon por la ĉisupre dirita. Temas pri mia nura opinio, tial mi ŝatus, ke ĉiu leganto prenu sian respondecon kaj donu sian opinion tre koncize al la redaktoro.

A. A.

« TURISMA FRANCUJO »

La « Esperantista Kulturdomo » en Grésillon, kiel la lastajn jarojn, organizas aŭtobusan karavanon okaze de la 42-a Kongreso en Marsejlo. La programo estas: Forveturo de Parizo la 29-7 al Chartres, Le Mans, Grésillon, Saumur, Poitiers; la 30-7, al Angoulême, Périgueux, Les Eyzies, Sarlat, Souillac; la 31-7, al Padirac, Rocamadour, Figeac, Rodez, Millau; la 1-8, al Montpellier-le-Vieux (rokeca haoso), Le Rozier, Jonte-valo, Meyrueils, Les Vignes, Tarn-valo tiel fama, Mende; la 2-8, al Florac, poste laŭ la vojo « Corniche des Cévennes », Ganges, Nîmes; la 3-8, al la konata Ponto de Gard, Beaucaire-Tarascon (kastelo de reĝo « René »), muelejo de Alphonse Daudet, Arles insulo Camargue kaj ĝiaj sovaĝaj virbovoj, Martigues, Marsejlo.

Ekskurso laŭ la Lazura Marbordo (programo ne ankoraŭ difinita) kaj la 10-8,

al Aix-en-Provence, Salon, pitoreska vilaĝo Les Baux, Saint-Rémy, Avignon (la karavano povos danci sur la ponto); la 11-8, al Vaucluse-fontano, Carpentras suprenveturo al monto Ventoux, Vaison-la-Romaine, Orange, Donzère-Mondragon, Montélimar, Valence; la 12-8, al la regiono Vercors, famkonata depost la lasta mondmilito kun la grandiozaj pejzaĝoj, Dié; la 13-8, al Crest, Le Teil, Aubenas, Ardèche-valo, Vals, monto Gerbier-des-Joncs, kie ekfluas Loire, Le Puy; la 14-8, al Monistrol, Saugues, Ruines, Garabit-viaduko, Saint-Flour, Murat, montoj Cantal, Aurillac, Mauriac; la 15-8, al Bort-les-Orgues, Le Mont-Dore, Puy-dôme, Clermont-Ferrand; la 16-8, al Riom, Sioule-valo, Moulins, Nevers, Briare, Montargis, Fontainebleau, Parizo.

Prezo: ĉirkaŭ 35.000 fr. fr.; por pliaj informoj turnu vin al S-ro R. DELAGNEAU, Avrolles, par Saint-Florentin (Yonne), Francujo.

VIAN ABONON 1957

Bonvole tuj sendu, por ke la sendo de la revuo al vi ne estu interrompita

Vidu sur la kovrilo la liston de la landaj perantoj. Aŭ sendu rekte al la Administranto: S-ro BDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.), Francio. Poŝt-ĉekkonto: 143-867 Nantes.

N. Gredal

Mi estas bona instruisto

Mi estas bona instruisto,
 neniu dubo pri tio.
 Mi amas la instruadon.
 Ĉiam estas ĉarma sento sidi katedre
 aŭ migri laŭ la vicoj
 per unu rigardo regante tutaŭ klason.
 Fiera sento estas observi la lernantojn,
 ke ili plaĉe staras, kiam mi eniras.
 Supereca mi estas pro mia rajto
 eligi miskondutan lernanton
 — ĉar vergo estas nedeca vorto,
 kaj la bona instruisto neniam ĝin bezonas.
 Sed mi rajtas vergi per vipo de mia sprito
 submetante la pekulon al rikano de l'kamaradoj.
 Supereca mi estas, ĉar mi scias pli ol la lernantoj.
 Mi konas ĉiujn jarciferojn
 kaj scias, kio okazis en ili.
 Mi konas ĉiujn landojn, gravajn urbojn,
 riverojn, montojn kaj lagojn,
 kaj mi scias, kie ili situas.
 Mi konas milojn da glosoj en fremdaj lingvoj
 kaj scias, kion ili signifas.
 Mi kapablas senhezite diri la plej malfacilajn tezojn
 de la geometrio,
 pruvi ilian pravon kaj apliki ilin,
 kaj por mi x kaj y ne estas nekonatoj.
 Mi indulgas, ke la lernantoj ne scias tiom multe.
 Mi estas pacienca pri ili,
 ĉar ili nur estas infanoj.
 Tion mi klopodas neniam forgesi.
 Mi starigas min sur ilia infaneca ŝtupo,
 ĉar tiel devas bona instruisto fari.
 Mi ŝercas kun ili,
 diras spritaĵojn,
 pro kiuj ili deve ridas.
 Mi ankaŭ ne kontraŭas, se unu el ili diras spritaĵon,
 kaj mi ridas, se ĝi ŝajnas al mi bona.
 Entute mi afablas al la lernantoj,
 estas ja moderne esti afabla kaj kamaradeca.
 Sed mi ne ŝatas, ke iu el ili frapas al miaj ŝultroj
 aŭ kontraŭstaras min,
 aŭ kredas ke li estas pli inteligenta ol mi.
 Ĉar fakte mi estas la instruisto,
 kaj kiu havas la oficon, nature ankaŭ havas la saĝon.

oooo

Mi ĝojas, ke mi estas instruisto
 kaj ne lernanto.
 Mi rajtas multajn aferojn, kiujn lernantoj ne rajtas.
 Mi rajtas malfrui ĉe la matenkantado.
 Mi rajtas resti en-dome dum interlecionaj paŭzoj:
 mi rajtas fumi en la lernejo
 cigarojn, pipon aŭ cigaredojn —
 Mi rajtas ciumi la lernantojn
 eĉ en gimnazio,
 sed ili ne rajtas ciumi min.
 Mi rajtas malfermitajn librojn dum lecionoj.

kaj mi rajtas noti, kiom mi volas en ili
sen risko, ke iu ordonas purviŝi tiun libron.
Mi ne bezonas fari la stil-taskojn,
kaj pro tio mi tre ĝojas.
Mi nur bezonas korekti ilin
dirante, ke ili estas la plej aĉa sterko,
kaj tio estas multe pli facila.
Mi ne bezonas mangi sur la korto,
sed mangas en la instruista ĉambro.
Kiom da ŝago estas en tiu instruista ĉambro,
en cerboj de la instruistoj
krom en vortaroj kaj enciklopedioj !
Tie troveblas ĉiuj eblaj kaj neeblaj aferoj
taŭgaj por imponi la lernantojn,
kaj kiujn ili forgesas jam antaŭ foriro de la lernejo.
Jen efektive unu el la tedaj aferoj :
La lernantoj tiom forgesas.
Foje mi pensas, ĉu eble mi tro multe postulas,
aŭ ĉu ili nur estas stultaj
kaj maldiligentaj — neinteresitaj —
apatiaj — inertaj — dormemaj ?
Sed tiajn pensojn mi forpuŝas plej rapide.
Ne povas esti eraro ĉe mi.
Miaj ekzamenoj finiĝis kun unuaj notoj.
Mi havas diplomon pri praktika instrukapablo.
Mi estas dungita de la aŭtoritatoj.
Mi estas inspektata
de speciale kvalifikitaj instruinspektorhelpantoj,
kiuj faras raportojn, donas konsilojn kaj gvidadon.
Ne povas esti eraro ĉe mi.
Mi estas bona instruisto.
Neniu dubo pri tio.

El la dana : Poul THORSEN.

N. GREDAL estas dana licea adjunkto.

Ĉu infano povas esti denaske dulingva ?

Ni ĉerpas la sekvajn liniojn el la « Gepatra Bulteno », kiu sin dediĉas al studo de la kialoj kaj teknikoj de la esperanta dulingva edukado. Ĉi-sube temas pri infano el hispano-nederlanda familio kaj kiu naskiĝis en Francio, vivas en Svedlando kaj kies ĉefa lingvo estas Esperanto. Ni opinias ke tio estas interesa fakta dokumento.

Pri la lingva evoluo de la knabo panjo scias raportti : « Kiam Esper estis malgranda, li ĉiam preferis, ke mi traduku la fabelojn en Esperanton anstataŭ rakonti en franca aŭ alia lingvo. Kaj nun mi legas el la nederlanda lingvo rekte en Esperanto al li. Mia instruisto certe estus fiero pri mi, se li aŭdis tion, ĉar mi vere ne estis bona lernantino. Kelkajn vortojn nederlandajn li ja ankaŭ komprenas kaj mi povas kanti al li kelkfoje holandajn kantojn. Sed kiam li venas al Nederlando, kun mia fratino li parolas Esperanton, kun mia nevino france, kaj kun mia bofrato li provas interkompreniĝi nederlandlingve. » Ni plue eksciis, ke en sia franca hejmlando li parolas ankaŭ hispane kun la avino kaj ni aŭdis, ke kun siaj kunuloj en la nuna gastlando li same babilas svede.

Se ni konsideras, ke ĉiujn lingvojn la knabo origine lernis praktike aplikante ilin aŭ en la familia ĉirkaŭo aŭ kontakte kun aliaj personoj kaj tute sen alia celo krom la kaŭzo de bezono — se ni konsideras tiajn spertojn, ni facile ekkonas, kiel senhazaĵ estas la aserto pri troŝarĝo de la infana cerbeto per nur dua lingvo denaska. Kiel infano plurlingva ofte nekonscie, sole laŭbezono, ŝanĝas de lingvo al alia, ankaŭ tiu observo montras, ke ideon pensatan apenaŭ tuŝas la mekanika parolfunkcio de kiu ajn lingvo. Ke tiun saman sperton ni trovas ankaŭ en familio, kiun ni povas nomi kvinlingveca, tio pravigas nian konsilon : « Praktiku — apliku la lingvon kiom eble ! » (*Gepatro Bulteno*, Nov. 56, p. 74).

Ni povas nur ampleksigi la konkludon de la « Gepatra Bulteno ». Praktiku la lingvon en ĉiu okazo : ne atendu la hipotezan grupkunvenon de la venonta monato... kie, cetere, — por ne forgesi ĝin — estos ekzercata la lingvon... nacian. Kaj se foje, vi konstatas ke vi ne kapablas esprimi ion el la ordinara vivo, kulpigu nur vin mem, sed ne la lingvon !

F. Cadenel

LA ANTINOMIOJ DE LA EDUKADO

La antinomioj de la edukado estas la kontraŭecoj renkontataj de la edukistoj por plenumi sian taskon.

Jen resumitaj la ĉefaj eduko-antinomioj :

1. — La lernantoj estas infanoj, kiujn la lernejo virigos. Ĉu oni traktos ilin, kiel infanojn aŭ kiel plenkreskulojn ? Ĉu longatempe oni konsideros ilin, kiel bestojn, kiujn oni dresas, aŭ frue kiel raciajn estaĵojn ?

2. — La lernantoj estas infanoj ; plenkreskuloj estas la edukistoj.

Ilia psikologio ne estas la sama ; infanoj ne estas ekzakte hometoj, kaj la plenkreskuloj estis modlitaj de estinta edukado. « La infano havas siajn proprajn vid- kaj pens-manierojn ». (J.-J. ROUSSEAU). Ĉu la plenkreskuloj bone komprenas la infanojn ? Ĉu la infanoj bone komprenas la plenkreskulojn ?

Ĉu viro bone komprenas la knabinojn, kiujn li instruas ? Ĉu estas profito aŭ maloportunaĵo konfidi knabojn al instruistino ?

3. — La hodiaŭaj lernantoj estas la morgaŭaj plenkreskuloj.

Kia estas la morgaŭa idealo ? Ĉu la edukisto devas antaŭvidi la estontan idealon ?

Ĉu la lernejo devas esti tradicia, konservativa, netolerema pri ĉiu novigaĵo ?

Ĉu la edukistoj povas samtempe adaptiĝi al la estanteco kaj pretigi la estontecon ? Kia estonteco ? Proksima aŭ malproksima ? Kaj, por la kredantoj, tera aŭ ĉiela ?

4. — La lernantoj estas individuoj, kiujn estas necese formi por la profito de socio.

Al kiu el ambaŭ, individuo aŭ socio, oni donos la antaŭecon ? Ĉu eblas respekti la personecon preparante por la socia vivo ? Ĉu eblas personeco, individua vivo, sen pretigado al la socia vivo ? Ĉu ne estas inklinoj malutilaj al la individuoj, kaj aliaj inklinoj, kiuj malutilas la socion ? Ĉu la socioj rajtas forferi la individuojn al sia estado, al la feliĉo de la plimulto de siaj membroj per naciaj aŭ religiaj militoj, per sociaj luktoj ?

Al kia socia grupo estas donata la rangsuperecon ? Ĉu al la familio, la korporacio, la kasto, la patrujo, la homaro ? Kaj laŭ la respondo, ĉu estos necese plifortigi precipe la korpon, la spiriton, la sentimentalajn vivon aŭ la volon ?

Ĉu ne necesas samtempe disvolvigi la individuajn eblecojn kaj prepari la infanojn al unu el la fakaj laboroj, kiujn postulas niaj socioj pli kaj pli diferenigitaj ?

Ĉu la ĝenerala edukado akordiga kun la profesia ?

Ĉar viroj kaj virinoj ĉiutage apudiras, ĉu la lernejo, kiu preparas la homojn al la vivo ne devas preferi la kunedukon de la seksoj, ol la disigon de la knaboj kaj knabinoj ?

5. — La edukisto devas formi la internan volon de la infanoj per ekstera devigo, eĉ trudo.

Ĉu la aŭtoritato ne oponas la aŭtonomion de la lernanto ? Se la infano mem povas formiĝi, ĉu la agado de la plenkreskulo estas favora ? Ĉis kia grado ?

Ĉu la volo de la plenkreskulo ne neigi la volon de la infano ? Kian el la edukadoj, libera aŭ dogma pli taŭgas elekti ?

6. — Ĉu ne estas neakordigebleco inter la lanta ritmo de la akiro de la konoj ĉe la infano kaj la impeta ritmo de la nuna instruado ?

7. — En la lernejoj, la samaj lecionoj kaj ekzercoj ofte estas donataj al malsamaj infanoj. Nu, instrui estas adapti.

Kiel solvi ĉi-tiun novan malfacilaĵon ? Ĉu necesas guvernisto por ĉiu infano ? Eĉ, se oni povus, ĉu ne estus preferinde, dum la instrutempo, doni plurajn instruistojn al ĉiu lernanto, por ke iliaj influoj kompensigu ?

8. — Ĉu izoleco en la familio, ŝirme de danageraj influoj kaj sub la direktado de guvernisto estas preferinda ol la edukado kiu, komune donita en la lernejo, kutimigas la infanojn vivi kune kaj pretigas ilin pli rekte al la vivo ?

Ĉu la ununura nacia instruado ne estas preferinda ol la privata, ol la kasta ? Ĉu ne estas timinde, ke la kasta edukado estas fermento de malamo kaj disigo de socia konkordo ?

Kun la preteksto forte enigi la elementojn en la grupon, ĉu oni devas senigi de la iniciatoj, esploradoj, kaj eksperimentoj, kiujn privata edukado povas provi ?


Por savi la infanon de la medio-influo, kiu iafaje kontraŭas la edukan influon, ĉu ni devas preferi la internulecon ol la eksterulecon ? Sed ĉu internulejo ne estas artefarita medio ?

9. — Ĉu edukado devas prezenti kiel ludo ? Ĉu oni devas postuli de la infanoj senpaŭzan kaj penigan streĉon ?

Konkludo. — Ĉi tiuj antinomioj estas malfacilaĵoj por la edukisto. Ĉiu socio, ĉiu grupo, ĉiu individuo akcentas jen aspekton, jen alian aspekton de la celo aŭ ebleco de la edukado, kaj proponas solvon laŭ sia idealo. Sed pli aŭ malpli vualitaj, ĉiam la antinomioj de la edukado restos gravaj demandoj, kiuj nepre instigos la pripenson de la edukistoj, kiuj ja devos elekti antaŭ ol efike agadi.

NI LERNU PER BILDOJ

En la Kuirejo



1. la ŝranko. — 2. la gasforno (de la kuiraparato). — 3. la lavoŝtono. — 4. la balailo. — 5. la kamentubo. — 6. la fridujo. — 7. la lavmaŝino. — 8. la krano. — 9. la gastuboj. — 10. la akvovarmigilo.

DEMANDOJ :

1. La patrino tenas kaserolon en la mano.

— Kio estas en la mano de Petro ?
Frukto.

2. Si kuiras la manĝaĵojn.

— Kion Petro manĝas hodiaŭ ? Li manĝas piron.

3. Petro sidas sur tabureto antaŭ la fridujo.


4. Li havas frukton en la mano ; li manĝas la frukton.

— Kiam li manĝos oranĝon ? Morgaŭ li manĝos oranĝon.


EKZERCOJ




La patrino staras — la lavoŝtono.
 — lavas la —.
 La telero estas — la mano — la patrino.
 Kie staras la patrino?
 Kio estas en la mano de la patrino?
 Kion la patrino lavas?



Petro sidas — la kuiraparato.
 Li manĝas —.
 Hieraŭ li — pomon.
 Kiu sidas sur tabureto?
 Kion manĝas Petro?
 Kiam li manĝos oranĝon?



La patrino havas — en la mano.
 Ŝi balaas la —.
 Ŝi balaas — la kameno.
 Kiu balaas la kuirejon?
 Kion balaas la patrino?
 Kie ŝi balaas?



La kaserolo estas — la kuiraparato.
 La — fumas — la kaserolo.
 La kuiraparato staras — la ŝranko.
 Kio estas sur la gasforno?
 Kie estas la gasforno?
 Kiu manĝos la supon?

Kvara Leciono

LERNU KAJ INSTRUU



Mi Fariĝis Esperantisto

Depost du monatoj mi lernas la internacian lingvon. Mi vizitas vesperan kurson de Esperanto.

La kursejo troviĝas en la gimnazio. La direktoro de la gimnazio rilatas simpatie al Esperanto. Same rilatas al ĝi la plimulto de la instruistoj. Ili volonte disponigis por la kurso unu el la klasĉambroj.

Mi deziras konigi al vi per kelkaj vortoj la kursejon : vasta ĉambro en la dua etaĝo de la gimnazio, kun duklapa pordo, tri larĝaj fenestroj, kiuj rigardas al sudo kaj donas abundan lumon. Dudeko da benkoj en du vicoj ; ĉiu benko estas por du personoj. Antaŭe — la katedro kaj la seĝo de la instruisto. Sur la muroj pendas kelkaj portretoj kaj bildoj. Unuvorte — hela ejo, kiu agrabligas la laboron.

Tra la fenestroj oni povas vidi la grandan urban preĝejon, la unuagradan lernejon kaj iom pli malproksime ankaŭ unu presejon. Vidiĝas ankaŭ la tegmentoj de pluraj domoj kaj malantaŭ ili vasta parko — la urba promenejo.

Ĝis nun ni havis 21 lecionojn. Ni jam ellernis la pli grandan parton de la gramatiko ; restas ankoraŭ kelkaj reguloj, kiujn ni facile lernos, kaj ankaŭ kvanto da afiksoj. Sed ni povas kompreni bone preskaŭ ĉian esperantan tekston.

Mi konvinkiĝis, ke Esperanto estas la plej facila el ĉiuj lingvoj en la mondo. Krome ĝi posedas aliajn tre valorajn kvalitojn, ĝi povas riĉigi la homan intelekton, faciligi kaj plimultigi la internaciajn rilatojn. Al mi kaj al miaj gekamaradoj en la kurso tre multe plaĉas la lingvo mem kiel lingvo kaj ankaŭ ĝia nobla celo kaj ni jam fariĝis fervoraj esperantistoj.

Mi penas interese pri Esperanto ankaŭ miajn gepatrojn kaj miajn gefratojn. Mia familio aŭdas de mi preskaŭ ĉiutage sufiĉe da laŭdoj pri Esperanto.

PROVERBOJ

Preĝejo proksima, sed dio malproksima.
Feliĉo fierigas, malfeliĉo saĝigas.
Kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas.
Geedzoj en paco vivas en palaco.

AFIKSOJ

SUFIKSOJ : ej, ig, iĝ.

EJ — Loko, en kiu oni faras ion, ekzercas iun profesion (dormejo, presejo, lernejo, laborejo) ; kie sin trovas io (grenejo, fruktejo). Plej ofte estas komprenata fermita loko — kun muroj kaj tegmento, sed estas kazoj ankaŭ de pli larĝa uzo : ĝenerale spaco, destinita por io aŭ karakterizata per io (densejo, tombejo = tombaro, herbejo — en senco de herbokampo).

IG — Fari ion aŭ iun esti ia aŭ ricevi certan kvaliton, aŭ fari ion :
 Pur-ig-i = fari ion (iun) esti pura.
 Blankigi = fari blanka, igi blanka.
 Junigi = fari iun esti juna.
 Venigi = fari iun veni, instigi iun veni.

IG — La persono aŭ la objekto, pri kiu rilatas la vorto, ricevas ia kvaliton, esprimitan per la radiko, kun li okazas tio :
 Pur-ig-i = ricevi kvaliton « pura ».
 Blankigi = ricevi blankan koloron.
 Junigi.
 Fariĝi = komenci esti.
 Leviĝi = levi sin ; sidigi = komenci esti en sida stato, komenci sidi ; stariĝi.

Memstara uzo de IGI kaj IGI : Mi igas ion pura = Mi purigas ĝin ; Mi igas pura = Mi puriĝas, mi fariĝas pura ; Mi igos lin lerni = Mi lernigos lin, mi instigos lin lerni.

Mi aliĝas al la esperantista societo = Mi fariĝas membro de la esperantista societo.

Mi forigas ion = Mi malproksimigas ĝin, mi lasas, jetas ĝin for.

PREFIKSO : ge.

Gepatroj = Patro kaj patrino kune, ambaŭ.
 Gefratoj = Frato kaj fratino, fratoj kaj fratinoj.
 Gesinjoroj, gekamaradoj.

EKZERCOJ

Li faras la muron esti blanka = Li ... la muron.
 Vi faras la tabulon esti nigra = Vi ... la tabulon.
 La knabo faras siajn ŝuojn puraj = La knabo ... siajn ŝuojn.
 La bona manĝo faros lin esti forta = La bona manĝo ... lin.
 La pura aero faros ĝin (esti) sana = ...
 La instruisto igas la lernantojn kanti = La instruisto ... la lernantojn.
 Nia instruisto igas nin paroli en Esperanto = Nia instruisto ... nin en Esperanto.
 Mia amiko igas nin ridi = ...
 La knabo igas jam granda = La knabo jam ...
 Vi igas (fariĝas) pli alta = Vi plialt ...
 Mia avo fariĝas maljuna = Mia avo ...
 Ĉu vi jam igis sata ? = ĉu vi jam ... ?
 Mi ne povas vidi la preĝejon tra la fenestro de mia ĉambro : de tie ĝi ne vid...
 La kudristo laboras en ...
 Oni preĝas en ...
 Ni tenas la fojnon en ...
 Onklo kaj onklino estas ...
 Knabo kaj knabino estas ...
 Edzo kaj edzino estas ...

ANONCETO

20 knaboj 13-jaraj volas interŝ. ilustr. poŝt. kun gejunuloj en aliaj landoj. Skribu al E-Klubo en Wien XVII Arzbergerg. 2 (Hauptschule) Aŭstrio.

9-a INTERNACIA FERVOJISTA
 E-KONGRESO

Rijeka (Jugoslavio) 11-18 Majo 1957.
 Adreso : Rijeka poŝtfako 95.

Aĉete (nova aŭ ne) aŭ prunte estas serĉataj la jenaj verkoj cele al grava laboro :

— *Bennemann* : Terminaro Pegogia kaj Psikologia.

— *Kamaryt* : Filozofia Vortaro.

Proponojn sendu al la redakcio :
 D-ro A. ALBAULT, 11, rue des Feuillants, Toulouse.

INFORMOJ

LIBRO

Nia kunlaboranto, prof. M. LAVARENNE (66, rue Blatin, Clermont-Ferrand) ĵus eldonis la verkon : « *Bon public, est-ce qu'ils l'auront ?* » en kiu li enketas pri kelkaj publicoj, propagandoj, antaŭjuĝoj kaj antaŭfiksitaĵoj. Li parolas pri la mirvekaj publicoj favore al sukero aŭ orango, al anti-doloraj premaĵoj aŭ al B.C.G. ktp. Li diskutas la antaŭjuĝojn pri prostituado kaj virin-negoco, pri vino ktp. ankaŭ pri la antaŭfiksitaĵoj opinioj kontraŭ popolunuiĝo, internacia lingvo, ekonomia revolucio, homeopatio, ktp...

Mendo ĉe la aŭtoro (850 fr. al P.ĉ.k. 28325 Clermont-Frérand).

EL LA GAZETOJ

« *Školske Novine* » (Lerneja Gazeto), Zagrebo, n-ro 38 de la 23 Nov. 56, publikigis artikolon de s-ano B. PIPINČ, instruisto, en kiu li raportas pri sia instruado de geografio pere de markoj, kiujn liaj lernantoj ricevis de siaj esperantaj plumamikoj.

La sama n-ro enhavas artikolon pri la 7-a volumo de la libroro « *La infanoj de la Mondo* », kiu aperas en Tokio. Fine ĝis montras la gravecon de tia tutmonda infankunlaboro kaj pledas por enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Pri la sama temo « *Narodni List* » (Nacia Gazeto), tagjurnalo en Zagrebo, en sia n-ro de la 25 Nov. 56 enpresis dukolonan artikolon kun du bildoj el la libro kaj la bildo de nia kunlaboranto Prof. F. NOVLIJAN, kiu gvidis la kolekton de la infanverketoj. La verkistino Z. FLEGO speciale pritraktas la jugoslavian parton de la libro.

Hispana instruista gazeto « *Escuela Espanola* » (Hispana Lernejo) n° 813, eldonita en Madrido, publikigis en Esperanto okaze de la 26-a IKUE-kongreso en Zaragoŝa, la paroladon de pastro BECKERS kaj menciis la esperantan paroladon de D-ro MORCILLO, ĉefepiskopo de Zaragoŝa. Krome aperis raporto pri la 17-a Hispana E-kongreso en Barcelono.

(Laŭ poŝtkartoj de E. CALVET, nia peranto, kiu petas ke ĉiulandaj instruistoj gratulu kaj kuraĝigu nian samideanon : S-ro Joaquín SOLANA, direktoro de la gazeto *Escuela Espanola*, calle Mayer, 4, Madrid).

« **UNIVERSALA RELIGIO** », la organizo kies celo estas la interfratiĝo de la homoj en la tuta mondo, ne diferencante ilin pro raso aŭ kredoj, adoptis por siaj internaciaj rilatoj la lingvon Esperanton. Ĝi vokas ĉiun homon kun bona volo al ia grava tasko de internacia fratiĝo pere de Kredo sen Dogmoj, kiuj nin disigas,

sed elektante, kaj sekvante, la vojon, kiu nin kondukos rekte al Dio, t.e., la Vojon de la Dia Amo.

Ĉiu intereso estas petata sin turni al la suba adreso por ricevi kompletajn informojn.

« **Universala Religio** », Poŝtkesto C.C. n° 142 - Suc. 13-B, Buenos-Aires, Argentino.

ESPERANTO KAJ GEMELIGO DE URBOJ

En Ardèche (Franclando), la urbo Aubenas ĝemeligiĝis kun tri urboj : Belga, Svisa, kaj Germana. Pri la du unuaj, malfacilaĵoj ne prezentigis, ĉar ĉiuj tie parolas france. Sed pri Schwarzenbeck la Germana urbo, estis alia afero. La urbestro de Aubenas, Senatano Molle, iris al Schwarzenbeck okaze de ceremonio pri ĝemeligo de la urboj. Tie ti ege sentis la neceson havi komunan lingvon. En Aubenas, la skribado al Schwarzenbeck estis farata de S-ro Jayer, kiu, krom germana lingvo, scias ankaŭ Esperanton. Nia Samideano proponis organizi kurson de Esperanto, kiu certe tre taŭgas por tia celo. La projekton tre favoras S-ro Molle, kiu konsentas prunti ĉambron en la urbodomo. La diversaj korespondantoj de la lokaj gazetoj helpas ankaŭ. Baldaŭ okazos, en la urbodomo, esperantista ekspozicio kaj speciala kunveno, kaj, tuj poste, malfermiĝos la kurso.

PRI I.P.R.


La redakcio publike dankas S-ron Theodor CEJKA, Redaktoro de « *Internacia Pedagogia Revuo* », Unua Periodo, pro donaco de la plena kolekto de lia I.P.R., aperinta de 1908 al 1910.

Koran dankon al S-ro W. ETZOLD pro donaco de 1 kajero de I.P.R., 1930.

La tradicio de I.P.R. datas jam de 48 jaroj ! Pri la Unua Periodo de I.P.R. vi cetere relegu la decembran numeron p. 118. Ni esperu, ke en Novembro 1958 ni povos festi la 50-an datrevenon de I.P.R. kun jam tute disvolviĝinta revuo. Sed ne forgesu : la legantoj, ne la redaktoro aŭ la verkistoj, kreas ian ajn gazeton ! Kia legantaro, tia gazeto !

Oni scias ke la Dua Periodo estis apero de « *La Novaj Tempo* » poste nomataj « *Internacia Pedagogia Revuo* » kaj eldonata de T.A.G.E. de 1922 al 1939.

La nuna Tria Periodo komenciĝis en Januaro 1956 per nia « *Esperanto kaj Kulturo - Internacia Pedagogia Revuo* » eldonata de G.E.E.



GRUK de KUMBEL. Traduko de Poul THORSEN. *Eldonita de Centra Dana Esperantista Ligo*. 72 p. 10,5 x 16. Po vinjeto de la aŭtoro sur ĉiu paĝo.

La konata dana Esperanto-poeto prezentas al ni traduke 66 miniaturajn poemojn el la miloj, kiujn aperigis la aŭtoro, Kumbel, en tagjurnalo de Kopenhago.

« Gruko » ŝajne estas elpensita vorto por novaforma poemeto, kies tipa aparato estas aldono de karikaturo vinjeto. Ĉu nura akcesoraĵo aŭ ĉu koncedaĵo al moderna urgemo, kiu volas atenti nur okulokaptajn erojn meze de la diskreskanta presajaro? Oni povas nur komenti ke tiuj bildetoj, ĉiam tre simplaj, per nur kelkaj plumstrekoj sukcesas krei taŭgan etoson enkonduke aŭ kompletige al ia poemeto: Ne temas pri du art-eroj apudmetitaj, sed pri unu uto esprimita duarte.

Kaj la samaj karakterizoj pentros la poemeton: per kelkaj vortoj trafaj, kelkfoje pikaj, li sukcesas difini situacion aŭ skizi aforismojn kiuj same, kiel la bildoj kaptas la atenton per sia sprito, sia neatenditeco aŭ sia elvokivo. Komprenible ni gustumas ĉi-tie la rekreon de nia poeto, de nia Poul THORSEN: sed ni ĝuas la plezuron gustumi la originalajn vinjetojn de la aŭtoro: La desegno ja internacias!

A. A.
 POLLANDO, n° 7, 1956, *ilustrita gazeto*, 32 p. 40 x 30, plus kovrilo. *Eldonejo Polonia. Aperas en la pola, angla, franca, germana, hispana, rusa. Escepte (?) tiu numero en la esperanta. Mendu ĉe « Prasa i Kszaka », Varsovio, Foksal 18. — Jarabono: 1.800 Fr. Fr.*

Grandformata revuo (40 x 30) prezentanta multajn fotojn, desegnojn, ankaŭ kolorajn fotojn kaj kolorajn arteproduktojn, ĝi iom memorigas pri la franca « Illustration » kiu antaŭmilite atingis mondfamon. Oni ne povas pli bone laŭdi tian luksan presteknikon... ne tre kutima ĉe esperantaj gazetoj.

La akompanaj tekstoj estas sufiĉe bonaj kaj oni devas gratuli la esperanto-zorgantojn, kiuj povis krei tian eldonon ankaŭ en nia lingvo. Tre certe temas pri provo kaj dependas de la intereso de la publiko ĉu ree aperos tiom grava kaj alloga gazeto.

La pritraktitaj temoj estas sufiĉe variaj: ili povas doni al internacia publiko aktualan bildon de Pollando vidita de poloj mem. Jen listo de almenaŭ la ĉefaj artikoloj:

Pollando, patrujo de Esperanto (de Isaj Dratwer), Festo de la Renaskigo (nacia pola festo: 22 jul.), Novaj koloroj kaj linioj (modernaj polaj ceramiko kaj ŝtofoj), En la Pola Sejmo (t.e. la pola Parlamento), Oni ne devas morti (la propra patrujo estas plej bona hejmloko), Ili volas konstrui pli bone (modernaj polaj domoj), La blua husaro (pentraĵo de Piotr Michalowski), Sur la vojo al sukceso (sportoj), La Sussex'oj en Sanniki (kokinbredado), La romantika teatro, ktp, ktp... A. A.

ESPERANTO POR INFANOJ de G. Gladstone SALOMON. 4-a eldono 1956. *The Esperanto Publishing Company*. 68 paĝoj 12 x 18. *Ilustrita*. 2 ŝil. 6 pencoj.

Kun tiu kvara eldono, tiu lernolibro atingas kvanton de 17.000 ekzempleroj. Ĉi-foje, ĝi aperas en apenaŭ reduktita formato, verŝajne per fotoreprodukto. Presliteroj tre klaraj.

Ĝi rakontas la vivon de la familio Muso kaj amuzas nin kun la aventuroj de la musido Johano, la malbona knabeto.

Tre simpla kaj gradigita legaĵo kun abundaj bildoj, tiu libreto aparte taŭgas por instrui Esperanton al legopovaj infanoj, ĉu kolektive, ĉu enfamile. Infanoj de 6 ĝis 14 jaroj, proksimume, povos trovi grandan intereson en tia rakonto. Junuloj, do ek de 15 jaroj, preferos ion alian, pli viglan, malpli naivan; kvankam tre certe ankaŭ ili bone iniciĝus per tiu taŭga perlega lernometodo.

Meze de paĝo 9, ne estis motivo uzi « ludojn » anstataŭ la ĝusta « ludilojn » (turboj, pilkoj... ktp, estas ludiloj, ne ludoj). A. A.

WARSZAWA (VARSOVIO) *Fotoalbumo* 36 p. 21 x 24. — *Habebla ĉe Asocio de Esp-istoj en Pollando, Varsovio, str. Kozia 3, kontraŭ libroj, gazetoj kaj aliaj esperantaĵoj.*

Tiu fotoalbumo montras al ni kelkajn fotojn pri la antaŭmilita Varsovio, pri la dummilitaj detruoj sed ĉefe pri la nuna rekonstruita Varsovio, kiu prezentigas kiel moderna urbo kun impona urbanismo kie estis restarigitaj ĉiuj iom valoraj arkitekturajoj.

Per mendo de tiu albumo (rekte aŭ ĉe libroservo) vi ne nur havos plaĉajn bildinformojn pri la Pola Ĉefurbo, sed vi ankaŭ ebligos al poloj havigi al si esperantajn librojn aŭ gazetabonojn el aliando.

Distra Pago

KONKURSO N° 1

(Aldono) S-ino Reyneau gajnis 2 poentojn.

KONKURSO N° 2

Jen la solvo :

Horizontale. — 1. Prezidanto ; 2. Monero ; 3. TA, Naft, Ja ; 4. RBT, BI, Rat ; 5. Orel, Imuna ; 6. Lumbo, Obut ; 7. Apo, Ko, Lai ; 8. NT, Fumo, RM ; 9. Dolaro ; 10. Onasernok (kongresano).

Vertikale. — 1. Patrolaŭdo ; 2. Abrupt ; 3. Em, Temo, Da ; 4. Zon, LB, Fos ; 5. Inab, Okule ; 6. Defii, Omar ; 7. Art, Mo, Org ; 8. No, Rubl, On ; 9. Januar ; 10. Onatatinok (komitatano).

Gajnintoj : S-ro Bourry, D-ro Jaromir Jermar, S-ino Le Goff, S-ino Pallard, S-ino Reyneau, S-ino Villette gajnis 2 poentojn. S-ro Berthold Fischer gajnis 1 poenton.

Ni gratulas ĉiujn.

KONKURSO N° 3

Ni petas pardonon pri la diversspecaj eraroj, kiujn, cetere multaj el vi lerte malkovris, kaj — tre afable — rimarkigis al mi. Des pli gratulindaj estas la gajnintoj.

Sed, ĉar la komencantoj certe forlasis la cerbumadon, ni redonas la korektan kradon, kaj petas vin legi tiele :

Horizontale :

5 (2-a vorto) : Bleki kiel tre ŝatata dom-besto (r).

6 (1-a vorto) : Parto de teatra verko ludata de aktoro.

7 (2-a vorto) : ŝati (r).

Kompreneble, oni povas sendi siajn solvojn ĝis la 25-a de februaro.

Jen la meritplenaj gajnintoj : F-ino Arnould, D-ro Jaromir Jermar, Ges-oj Lanz, S-ino Lavallée, S-ro Le Coze, S-ino Lemoine, F-ino Robin, S-ino Gudu-la Thénée gajnis 2 poentojn.

S-ro Génuit gajnis 1 poenton.

Ni tutkore gratulas ĉiujn.

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|----|
| 1 | | | | | | | | | | |
| 2 | | ■ | | | | | | | | ■ |
| 3 | | | ■ | | | | | | | ■ |
| 4 | | | | ■ | | | | ■ | | |
| 5 | | | | | ■ | ■ | | | | |
| 6 | | | | | ■ | ■ | | | | |
| 7 | | | | ■ | | | | ■ | | |
| 8 | | | ■ | | | | | | ■ | |
| 9 | | ■ | | | | | | | | ■ |
| 10 | | | | | | | | | | |

KONKURSO N° 5

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10

| 1 | | | | | | | | | | |
|----|--|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 2 | | | | | ■ | ■ | | | | |
| 3 | | | | ■ | | | ■ | | | |
| 4 | | | ■ | | | | | ■ | | |
| 5 | | ■ | | | | | | | ■ | |
| 6 | | ■ | | | | | | | | ■ |
| 7 | | | ■ | | | | | ■ | | |
| 8 | | | | ■ | | | | ■ | | |
| 9 | | | | | ■ | ■ | | | | |
| 10 | | | | | | | | | | |

Horizontale :

1. Memoriga festo.
2. Inverse : rango de aferoj ; inverse : tre venena gaso (r).
3. Fantazia imajo (r) ; fonetike : malgloro ; hararo kovranta la korpon de kelkaj bestoj (r).
4. Inverse : ekkrio por alvoki ; reprodukti per metalaj literoj (r) ; inverse : angla biero (r).
5. Ekkriante plendojn pro malfeliĉo.
6. Inklina al deziro havi la posedaĵon de aliulo (r).
7. Fonetike : inklino al persono ; in-sektomanganta mambesto (r) ; inverse kaj fonetike : ebena aŭ ŝajne ebena parto, el kiu io elreliefiĝas.
8. Centra parto de rado (r) ; inverse : participa finaĵo (r) ; meti je dispono de iu (r).
9. Pro tiu kaŭzo ; disdono farita per sorto.
10. Inverse : parto de nia planedo.

Vertikale :

1. Ni devas helpi lin, por ke li fariĝu bona Esperantisto.
2. Inverse : fabela serpento (r) ; inverse : en tiu tempo.
3. Inverse : cifero ; ekkria vorteto ; trempi por kuraci (r).
4. Inverse : verba finaĵo ; senti bedaŭron pro farita kulpo (r) ; inverse : prepozicio.
5. Silka bendo (r).
6. Parto de objekto destinita por teni ĝin oportune.
7. Sufikso ; nekulturita kaj senarba ebenaĵo (r) ; inverse kaj fonetike : teksaĵo.
8. Inverse : ne plu teni (r) ; sufikso ; inverse : interplektaĵo (r).
9. Pro kia kaŭzo ? ; mallonga skriba rimarko.
10. Inverse : sekreta sciigo.

Bonvolu sendi viajn solvojn ĝis la 25-a de la venonta monato al S-ro Guillot, Cours de la 4^e République, Gaillard (Hte-Savoie) Francujo.

PERANTOJ DE I. P. R.

BRITA : « *The British Esperanto Association* », 140, Holland Park Avenue, London, W 11.

Jarabono : 8 ŝilingoj.

BULGARA : Ivan H. KRESTANOF, str. 6 Septemvri, 2., Sofia.

Jarabono : 8 levoj.

DANA : « *Dansk Esperanto-Forlag* », Ingemannsvej 9, Aabyhof. (Cek-konto :16.295).

Jarabono : 8 kronoj.

GERMANA : Helmut ROSSLER, 22 b, Hechtsheim bei Mainz, Friedensstr. 15. Cek-konto : 43 357 Ludwigshafen/Rhein.

Jarabono : 48 germanaj markoj.

HISPANA : E. CALVET, Pl. Gral Sanjurjo, 7, Tarragona. (Konto n° 956-293 ĉe « Banco Espanol de Credito »).

Jarabono : 44 pesetoj.

ITALA : Eduardo ZUMBO, Via del Carmine, 4, Torino.

Jarabono : 700 liroj.

JUGOSLAVA : Josip VAJDLIH, Podolje 15, Zagreb. (Cekkonto : Cradska Stedisnica Zagreb, 406-606/I br 46 53).

Jarabono : 330 dinaroj.

NORVEGA : Erling HOLTEN, Leangen i Strinda.

Jarabono : 8,50 kronoj.

SOVET-UNIA : Roberto DVORKIN, Esperanto-Sekcio de Kulturdomo, Leningrad, 22, Kirovskij 42.

SUOMA : Joel VILKI, Somero, poŝtkonto : Tu 60 253.

Jarabono : 300 suomaj markoj.

SVEDA : « *Eldona Societo Esperanto* », Box 19071, Stockholm (Poŝtĉeka Konto : 578).


Jarabono : 6 kronoj.

SONA : Jarvis E. BUSH, 3.700 North 75-th Street, Milwaukee 16, Wisconsin.

*
**

ALIAJ LANDOJ : Sin turni al nia administranto : E. BIDON, 6 rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.) Francio. (Poŝtĉeka konto : 143-867 Nantes). Provizore la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj de U.E.A. peras la abonojn. Jarabono : 400 francaj frankoj aŭ egalvaloro.

Ni daŭre serĉas perantojn.



La Esperantista Kulturdomo

Kastelo « GRÉSILLON »
BAUGÉ (M.-et-L.) Francio
Tél. 34

FRANCA KULTURDOMO

Restadoj dum somero 1957

La Kastelo Grésillon estos malfermita de la 1-a de Junio ĝis la 14-a de Septembro 1957.

1-a Periodo : 1-an de Junio — 14-an de Julio

Kursoj de Esperanto por komencantoj — Instruado de amatora bindarto
Turismaj karavanoj

2-a Periodo : 14-an de Julio — 24-an de Julio

Sensacia Manifestacio :

Kulturaj Internaciaj Ferioj

Kun Profesoroj AULD, LAPENNA, WARINGHIEN,
Dro ALBAULT kaj Ing. WATIER

3-a Periodo : 25-an de Julio — 10-an de Aŭgusto

La Franca Lingvo

por alilandaj samideanoj

Eksterordinare bona metodo por instrui rapide la francan lingvon pere de Esperanto, kursoj por komencantoj kaj por perefktigemoj. Necesas uzi sufiĉe bone Esperanton.

4-a Periodo : 10-an de Aŭgusto — 31-an de Aŭgusto

Somera Lernejo - Tri kursoj de Esperanto

5-a Periodo : 1-an de Septembro — 14-an de Septembro

Fakaj Renkontiĝoj - Liberaj Ferioj